# *Komplete restarigita la elektra sistemo en Karakaso*



Karakaso, 23 jul (RHK) La elekta korporacio nacia (Corpoelec) de Venezuelo informis ?i-marde ka la servo de elektra energio estis restarigita je 100% en Karakaso kaj oni laboras por normaligi ?in tutlande, post ricevi novan atakon lunde, al la elektra sistemo.

La elektra kompanio raportis per la socia reto Twitter ke oni da?re avanca en la kompleta restarigo de la elektra sistemo, sciigis la televida ?eno Telesur.

La ministro de popola povo por elektra energio, Freddy Brito, per la sama socia reto sendis gratulojn al la popolo venezuela pro la civita karaktero kaj sindevigo favore al paco, kaj aprezis la klopodojn faratajn de la laboristoj de tiu sektoro por restarigo kompleta de la elektra sistemo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/196894-komplete-restarigita-la-elektra-sistemo-en-karakaso

# Radio Habana Cuba